

Niaj impresoj el Francio



Hallo und herzlich willkommen, liebe Leser,

Zur letzten *kune* in diesem Jahr. Gerade rechtzeitig sind wir heimgekehrt, um euch eine neue Ausgabe zusammenzuschneiden und euch dabei natürlich von weiteren von uns entdeckten Sehenswürdigkeiten Europas zu berichten. Wir hoffen, dass euch das interessiert. Wenn nicht – lasst es uns wissen! Schickt uns eine email an kune@esperanto.de, hinterlasst uns eure Vorschläge für die *kune* auf unserer brandneuen facebook-Seite oder sagt es uns persön-

lich auf der Jahreshauptversammlung der DEJ. Immerhin seid ihr die Mitglieder der DEJ und diese Zeitschrift ist eure Zeitschrift. Was fandet ihr gut dieses Jahr und was muss eigentlich nicht sein? Was schlagt ihr stattdessen vor? Wir sind immer für Anregungen offen :-)

Bis dahin – ein frohes Fest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!

Miriam, Caroline und Carl

Deutsche Esperanto-Jugend e.V., die Bundesvorsitzende Julia Hell, Zschopauer Straße 144, 09126 Chemnitz gej.prezidanto@esperanto.de

GEJ invitas al la jarĉefkunveno la 31an de decembro 2011 je la 14a horo en la kongresejo de Gdansk kadre de la 3a Junulara Esperanto-Semajno.

Ankaŭ ĉi-jare estos speciala okazo: La GEJ-estraro bonvenigos pliajn estraranojn!

Mi persone bedaŭrinde forlasos la estraron – tamen kun tre ĝoja vizaĝo kaj bonega perspektivo!

Memoru nian moton: Venu - informiĝu – aktiviĝu! La estraro ĝojas pri via aktiva partopreno! Cetere kuko kaj trinkaĵoj estos surloke haveblaj.

La provizora tagordo estas:

1. Malfermo kaj elekto de la kunsida gvidanto, elektogvidanto kaj protokolanto
(same valida por inaj personoj)
2. Voĉdono pri la tagordo
3. Traktado de la estrara kaj kasa raportoj kaj diskutado pri ili
4. Laborplano por 2012
5. Senŝarĝigo de la estraro
6. Elekto de federacia estraro
7. Diversaĵoj (via vico kaj nia vico)
8. Decido pri la loko kaj dato de la venonta jarĉefkunveno en 2012
9. Solena fermo

La estrara raporto aperos en la venonta numero de *kune*. La kasa raporto kaj la raporto de la kaskontrolantoj estos disdonataj komence de la jarĉefkunveno.

Se vi havas demandojn aŭ aldonojn, bonvolu kontakti min.

Mi esperas bonvenigi grandan kaj viglan partoprenantaron dum la venonta JES kaj same grandan kaj aktivan voĉdonantaron dum la jarĉefkunveno.

Die Deutsche Esperanto-Jugend lädt zu ihrer Jahreshauptversammlung ein. Diese findet am 31.12.2011 um 14 Uhr in Danzig im Rahmen der Jugend-Esperanto-Woche statt.

Auch dieses Jahr ist es ein besonderes Ereignis, denn der Vorstand wird neue Vorstandsmitglieder begrüßen.

Ich persönlich werde den Vorstand leider verlassen – jedoch mit fröhlicher Miene und großartigem Ausblick.

Denkt an unser Motto: Kommt – informiert euch – macht mit! Der Vorstand freut sich über eure aktive Teilnahme! Außerdem gibt es Kuchen und Getränke!

Die vorgeschlagene Tagesordnung:

11. Begrüßung und Wahl eines Sitzungsleiters, eines Wahlleiters und eines Protokollführers (gleichsam gültig für weibliche Personen)
2. Abstimmung über die Tagesordnung
3. Vorstellung des Vorstandsberichtes und des Kassenberichtes mit anschließender Diskussion darüber
4. Arbeitsplan 2012
5. Entlastung des Vorstandes
6. Wahl des Bundesvorstands
7. Verschiedenes (ihr seid – wir sind an der Reihe)
8. Entscheidung über Ort und Zeit der nächsten Jahreshauptversammlung 2012
9. Feierlicher Schluss

Der Vorstandsbericht erscheint in der nächsten *kune*. Der Kassenbericht und der Bericht der Kassenprüfer werden zu Beginn der Jahreshauptversammlung verteilt.

Falls ihr Fragen habt, wendet euch bitte an mich.

Ich hoffe, möglichst viele lebhaftige Teilnehmer auf dem kommenden JES und auch zahlreiche aktive Mitglieder auf der Jahreshauptversammlung begrüßen zu dürfen.

Via Julia Hell, prezidantino de la Germana Esperanto-Junularo

38 Esperanto-parolantoj en unu kebabejo: Ne bezonatas multe pli por kompletigi la konfuzon, speciale por la servisto. Bonŝance la Aktivula Renkontiĝo, kiu okazis en Dreseno de la 28a ĝis la 30a de oktobro, entute ne estis konfuzoplena, sed bonege organizata.

Dum vendredo la jam menciitaj 38 personoj alvenis sur la junulara gastŝipo. Tuta ŝipo estis plena de Esperantemuloj el Germanio, Ĉeĥio kaj Pollando. Ankaŭ tio eble ne estas ĉiutaga afero.

Vendredon vespere ankoraŭ okazis interkona vespero kaj poste drinkejumado. Sabate la partoprenantaro aŭskultis prelegojn de Lu Wunsch-Rolshoven kaj Rolf Fantom pri varbado kaj organizado de renkontiĝoj. Kompreneble ankaŭ restis tempo por



promeni tra la urbo kaj festumi, kaj sur la ŝipo, kaj en drinkejo. Ankaŭ landaj kunsidoj estis parto de la programo.

La dimanĉo komenciĝis per laborsesio gvidata de Julia Hell. La sesio temis pri la ŝancoj kaj malŝancoj, kaj pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de Esperanto. La aranĝo dimanĉe finiĝis per „festa“ malinaŭguro en la ankaŭ jam menciita kebabejo.

Celo de la Aktivula Renkontiĝo oficiale estis, subteni aktivajn junulojn en iliaj kompetentecoj kaj danki al aktivuloj, kiuj jam delonge laboras por plibonigi Esperantion. Flanke al tiuj oficialaj celoj la aranĝo ankaŭ havis la efikon, ke aktivaj homoj el tri najbaraj landoj interkonatiĝis. Tio por mi eĉ estis pli grava ol ĉio alia.

Carl

La lando, kie la homoj neniam laboras kaj ĉiam strikas ... Francio!



Calanque

Jes, en Francio ni restis la plej longan tempon dum nia vojaĝo. Kaj malkovris, ke ne nur Parizo tute vizitindas - ĉiu urbo, kiun ni vizitis, havis sian propran ĉarmon! Do ni volas rakonti al vi, kio vidindas en Francio krom la Eiffel-turo.

Caen

En la nordo de Francio, en Normandio, troviĝas ne tro granda kaj tre malnova urbo. Tie okazis kelkaj gravaj historiaĵoj, tiel ke la vizito de la diversaj vidindaĵoj koncernas multe da epokoj. La plej gravaj certe okazis dum mezepoko, kiam Vilhelmo konkeris Brition, kaj dum la Dua Mondmilito, kiam la aliancanoj alboridiĝis en Normandio en 1944.

La kastelo de Vilhelmo la Konkeranto

Tre potence kaj imprese staras meze de la urbo la kastelo de Vilhelmo la Konkeranto. Ĉe niaj unuaj gastigantoj, ni havis la bonŝancon, ke ni nur devis rigardi tra la fenestro por vidi la kastelon. La plej bone konservita parto de la kastelo estas la muroj ĉirkaŭe. Interne ankaŭ troviĝas apud la ruinoj la interesa muzeo de Normandio.

Ni rekomendas, nokte trapromeni la korton kaj iri sur la muroj, ĉar la aspekto de la iluminita preĝejo Saint-Pierre bonegas.

La Abbeye-aux-Hommes

Vilhelmo konstruigis Abbeye-aux-Hommes por kontraŭefiki al la papa malplaĉo pro sia edziĝo al sia kuzino Matilde. En tiu bela preĝejo ankaŭ troviĝas la tombŝtono de la Konkeranto, ĉar li ja en tiu konstruaĵo enteriĝis. Sed la tombŝtono ne estas la originala, ĉar tiu detruigis kaj ankaŭ la ostaron de Vilhelmo oni forĵetis. Nun la konstruaĵo enhavas la urbodomon, sed oni povas partopreni gvidadon tra la nuna preĝeja parto de la konstruaĵo. Kun bonŝanco oni kaptas la maljunulon, kiu faras tion senpage. Sed por tio oni bezonas kompreni la francan, kaj certe oni ne kredu ĉion, kion li rakontas ;-)

L'Embucade

Vere embuska estas tiu drinkaĵo, kiun ni gustumis en Caen ĉe niaj gastigantoj. Oni drinkas ĝin kiel bieron, sed ĝi ebriiĝas pli forte. Embucade estas miksaĵo de biero kun blanka vino, granata siropo kaj Calvados. Pro tio oni povas drinki ĝin pli kaj pli, ĉar la drinkaĵo ja dolĉas. Dum la drinkumado ni ludis bilardon ... Kaj kun la konsumado de tiu drinkaĵo pligrandiĝis la ebrio kaj certe ankaŭ la malboniĝo de la ludo ;-)

Mémorial (memorigejo) de Caen

Iom multekosta, sed vere vidinda estas tiu muzeo pri la eŭropa historio de la Unua Mondmilito ĝis la germana Murfalo (kaj fino de la tiel nomata Malvarma Milito). Ĝi tiel grandegas, ke ni nur vidis etan parton, kvankam ni enestis proksimume 3 ĝis 4 horojn. La muzeo havas multege da materialoj kaj grandegan ekspozicion. Tamen ili estas tre bone prezentataj, preskaŭ metafore. Al tiuj, kiuj havas intereson pri historio, ni forte rekomendas tiun muzeon!

Lyon: La KoToPo kaj la Parc de Tête d'Or

Mille et Une Langues estas asocio, kiu organizas lingvajn kursojn, babiladajn kunvenojn, koncertojn aŭ prelegojn ... Dume oni povas drinketi aŭ legadi, ĉar ĝi ankaŭ enhavas drinkejon kaj etan librotenejon. Do, la etoso bonegas, ĝi tamen tre diversas: kelkfoje vere trankvila kaj babilema, poste iom brua sed bonmuzikema ... Se oni aperas je la ĝusta horo, oni povas paroli en ĉiu lingvo, kiun oni scipovas. Laŭ mi la KoToPo estas tre agrabla ejo. Lastjare mi laboretis tie por du semajnoj kaj dume mi multege amuziĝis (kaj lernis la francan). Do mi vere ĝojis reveni tien. Kaj Andrea, la bufedisto kuiras bonegan Ĉajon!

La Parc de Tête d'Or ne nur estas parko, sed ankaŭ senpaga besto- kaj planto-ĝardeno. Promenante tra grandegaj forcejoj oni povas ekscii pri la plantaro de la regiono kaj la mondo, kaj en la bestoĝardeno troviĝas eĉ tre maloftaj bestoj kiel la amura leopardo, de kiu restas nur 40 sovaĝaj ekzempleroj en la mondo. Ankaŭ por sportemuloj la grandega ejo bonas – la longaj, belaj vojoj perfektas por kurado, biciklado ktp.

Marseille

La sudfranca urbo Marseille estas vere mult-kolora kaj -kultura, iomete malpura kaj – jes ja – tutapud la maro ;-) Multege da homoj venas el la arabaj aŭ nordafrikaj landoj por komenci novan vivon en Francio aŭ Eŭropo. Pro tio impresas la mult-kultureco. Ĉie oni aŭdas fremdajn lingvojn kaj oni povas aĉeti kuriozaĵojn por manĝi, porti aŭ drinki.

La Calanque

La plej mojosa afero, kiun ni faris tie, estis la veturado al la tiel nomata Calanque, montareto apud la maro. Ni veturis duonan horon aŭte al urbeto kaj grimpis laŭlonge de la klifoj de la maro sur etaj grimpvojoj, tutebenaj kaj facilaj, aŭ krutaj, kiuj kondukas inter arboj aŭ tra arbetaro. Oni ne havu altotimon, ĉar kelkfoje apud la vojo estas nenio, nur la abismo. La panoramo ĉirkaŭe montras belegan pejzaĝon: Unufanke la vasta maro, aliflanke rigardo al tuta Marseille kaj malsupre la impresa alfrapo de la ondoj – Mojose!

Neforgesende: ni ĉie en Francaj urboj trovis tri aĵojn: estis minimume unu platana aleo, infana karuselo kaj certe ĉiam jen kaj jen monumento pri la Unua aŭ Dua Mondmilito. Do, se vi ne certas, en kiu lando vi estas – se vi vidas tion, estas Francio ;-)

Caroline, Miriam

·kune· estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Julia Hell;

Vicprezidanto: Leo Sakaguchi; Pliaj estraranoj: Clemens Fries, Sophia Berlin, Helen Geyer kaj Liesa Alfier

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>